

DUA DIMANĈO POST KRISTNASKO – 5an de januaro 2013

LA VORTO FARIĜIS KORPO KAJ EKLOĜIS INTER NI – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El evangelio laŭ Johano 1,1-18

[En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis ĉe Dio, kaj Dio estis la Vorto;

Li estis en la komenco ĉe Dio. Ĉio estiĝis per Li, kaj sen Li estiĝis nenio kio estiĝis.

En Li estis la vivo, kaj la vivo estis la lumo de la homoj, kaj la lumo brilas en la mallumo kaj la mallumo Lin ne venkis.]

Aperis homo sendita de Dio; lia nomo estis Johano. Li venis kiel atestanto, por atesti pri la Lumo, por ke ĉiuj ekkredu pere de li. Li ne estis la Lumo, sed li estis sendita por atesti pri la Lumo.

[La vera Lumo, kiu lumas al ĉiu homo, venis en la mondon. La Vorto estis en la mondo, kaj la mondo fariĝis pere de Li, sed la mondo ne ekkonis Lin.

Li venis al sia propraĵo, sed liaj propruloj ne akceptis Lin.

Sed al ĉiuj, kiuj Lin akceptis, Li donis potencon fariĝi filoj de Dio, al tiuj, kiuj kredas en lia nomo, kiuj ne el sango, nek el volupto, nek el volo de la viro, sed el Dio naskiĝis.

Kaj la Vorto fariĝis korpo kaj ekloĝis inter ni. Kaj ni vidis lian gloron, la gloron de la Ununaskito de la Patro, plena de graco kaj vero.]

Johano atestas pri Li, kaj laŭte diras: "Li estas tiu, pri kiu mi diris al vi: Kiu venas post mi, tiu superas min, ĉar Li estis pli frue ol mi."

El lia pleneco ni ĉiuj ricevis gracon post graco. Dum la Leĝo estis donita de Moseo, la graco kaj la vero alvenis pere de Jesuo Kristo. Dion neniu vidis, sed la ununaskita Filo, kiu estas en la sino de la Patro, pri Li nin instruis.

En la prologo al sia Evangelio Johano resumas kaj difinas la tutan enhavon de sia verko. Ili estas do dekok altvaloraj kaj tre tre riĉaj versikloj. Por ilin kompreni ni komencu per la sensacia aserto ke la evangeliisto metas je la fino de la prologo. Skribas la evangeliisto "*Dion neniu vidis*". Tiu estas aserto grava, sendiskuta, kiu, interalie, kontraŭdiras la Bibliion mem, ĉar en la Biblio oni asertas ke Moseo kaj aliaj personoj vidis Dion.

Johano ne samopinias, "*Dion neniu vidis*". Pro tio la priskriboj pri Dio faritaj, ankaŭ flanke de Moseo, estas limigitaj, nekompletaj, foje devojigantaj, aŭ eĉ malveraj. Do Dion neniu vidis. "*la ununaskita Filo*" ununaskita en la senco de la ununureco de tiu filo, "*kiu estas Dio*", kiu estas li mem Dio, "*kaj estas en la sino de la Patro*", tio estas en plena intimeco kun la Patro, "*pri Li nin instruis.*"

Per ĉi tiu aserto la evangeliisto konkludas la prologon invitante do meti la tutan atenton sur la bildon de Jesuo. Kion volas diri ke Dion neniu iam ajn vidis kaj nur la filo pri Li nin instruis? Ke ne Jesuo samas kun Dio, sed ke Dio samas kun Jesuo. Se ni diras ke Jesuo egalas al Dio tio signifas ke ni havas bildon, ideon pri Dio.

Nu la evangeliisto invitas nin suspendi tiun bildon kaj fokusigi nian tutan atenton al Jesuo. Ĉio kion ni vidas en Jesuo, tio estas Dio. Do ne Jesuo samas al Dio, sed Dio samas al Jesuo, kaj pluraj bildoj kaj pluraj ideoj pri Dio, vidante la konduton kaj instruadon de Jesuo, neeviteble forfalos.

La evangeliisto do nin invitas meti nian tutan atenton sur Jesuon, ĉar en li manifestiĝas Dio. Kaj ĝuste en Jesuo manifestiĝas la dieco, kaj ni retroiru en ĉi tiu legado de la prologo, estis bezonata nova rilato inter la homoj kaj Dio. Moseo, la servanto de Dio, neprigis iun rilaton inter la servantoj kaj ilia Sinjoro, bazita sur la obeo, nu Jesuo, kiu ne estas la servanto de Dio, sed la filo de Dio, proponas novan rilaton inter filoj kaj ilia Patro, ne bazita sur la obeo, sed sur la simileco kaj la akcepto de lia amo.

Jen kial en la versiklo kiu antaŭas la evangeliisto skribis "*Dum la Leĝo estis donita de Moseo, la graco kaj la vero*" graco kaj vero estas esprimo kiu indikas la amon fidelan, la amon veran "*alvenis pere de Jesuo Kristo*". Do iu nova rilato ne plu bazita sur la leĝo, sed sur la akcepto de lia amo.

Kaj, ĉiam retroirante en la legado de ĉi tiu prologo, skribas la evangeliisto "*El lia pleneco*" tio estas el la pleneco de tiu homo en kiu manifestiĝas la dia kondiĉo, *ni ĉiuj ricevis gracon post graco*". Kion volas diri la evangeliisto? Estas la dinamismo de la vivo de la kredanto kaj de la kristana komunumo.

Al la amo ricevita de la Patro korespondas amo transdonata al la gefratoj, tiu estas la kresko-dinamismo de la kredantoj. Ju pli grandos la respondo de tiu amo al la frato des pli, siavice, grandos flanke de Dio la respondo de lia amo. Do des pli ni komunikas tiun amon al la gefratoj, des pli ni ricevas de Dio amon. Tio en senfina kresĉendo.

Tiu kreskado en la amo estas tio kio realigas la individuon kaj la kredanton. Kaj ankoraŭ retroirante kaj saltante iujn versiklojn, la grava aserto de la evangeliisto ke "*la Vorto*", la 'Vorto' signifas la kreaĵon vorton, la kreaĵon saĝon "*fariĝis...*", la evangeliisto ne skribas ke tiu fariĝis homo, sed utiligas la terminon korpo, kiu indikas la homo en sia tuta malforteco.

La projekto de Dio ne realiĝas en iu superhomo, malfacile imitenda, nur admirenda, sed ĝi realiĝas en la homa malforteco. Tio signifas ke Dio manifestiĝas en la homaro. Ju pli la homo iĝas homa des pli li manifestas la diecon kiu estas en li. Kaj tiu Vorto fariĝis korpo, tiu projekto de Dio, kiu fariĝas korpo, estas la pleneco de la amo de Dio kiu manifestiĝas en iu homo kiu iĝas la ununura vera sanktejo de kiu disradias la amo de la Patro.

Kaj tiu Vorto kiu fariĝis korpo, fariĝis homo en lia malforteco, skribas la evangeliisto, "*plena de graco kaj vero*", tio estas kompleta. La karakterizo kiu distingas Jesuon estas la fidela amo. Kiam la amo estas vera? Kiam ĝi estas fidela. Kaj tiu Vorto kiu fariĝis korpo, kiu fariĝis homo, resendadas nin do al la komenco de la prologo, kie la evangeliisto skribas "*En la komenco estis la Vorto*".

Johano distanciĝas disde la teologio de la libro de Genezo, kie estis asertite ke "*En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron*". Ne, la evangeliisto ne samopinias, komence, eĉ antaŭ ol krei la ĉielon kaj la teron, estis tiu Vorto, tio estas tiu krea vorto, krea saĝo, iu vorto kiu havas projekton kaj, eĉ antaŭ la kreado, tiu projekto pridemandis Dion.

Kaj kiu estis tiu projekto? Donaci al la homo la dian kondiĉon. Tiu estas la projekto de Dio por la homaro, do ni povas difini la prologon himnon de amo de Dio por la tuta homaro, himnon de la optimismo de Dio. Dio estas

tiom enamiĝinta al la homoj ke, eĉ antaŭ ol krei la mondon, li havis la projekton doni al la homoj sian saman kondiĉon, la dian kondiĉon.

Kaj pro tio, ĝuste meze de la prologo, do en la plej grava versiklo de la tuta komponaĵo, la evangeliisto skribas ke "Dum tiu projekto venis inter la siaj, kaj la siaj ne ĝin akceptis", tiu estas admono ĉiam ĉeestanta por ĉiuj komunumoj, "*Sed al ĉiuj, kiuj Lin akceptis, Li donis potencon fariĝi filoj de Dio*".

Filoj de Dio oni ne naskiĝas, sed iĝas, akceptante Jesuon kiel amoprojekton de Dio por propra ekzisto. Tiu fakto ke eblas iĝi filoj de Dio por tiuj kiuj akceptas Jesuon, signifas ke Dio do ne absorbas la homon, ne lin fortiras aŭ distras de la aliaj, temas pri iu Dio kiu potencigas la homon, kiu komunikas al li sian saman amkapablon por ke kun li kaj kiel li tiu iru al la aliaj.

La novaĵo portata de Jesuo estas ke oni ne plu vivas por Dio, sed oni vivas per Dio. Tiu estas la prologo de Johano, do himno al optimismo de Dio por la homaro kaj propono por ĉiu homo iĝi filo de Dio. Filoj de Dio oni ne naskiĝas, sed iĝas, per daŭra kaj ĉiutaga elekto de la fidela amo samkiel tiu kiun la Patro komunikas al ni.